TEA-BULTENO

22ª JARO - N° 149 **NOVEMBRO-DECEMBRO** **N.11-12/2019**

Kiom pli koruptita estas la ŝtato, tiom pli nombraj estas la leĝoj.
Tacito (P. Cornelius Tacitus) (55 d.C. ?-120 d.C.?)

Fikcia intervjuo kun 160-jara Zamenhof

Mi fermas la libron: *Homarano - La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof* estas ĝia titolo. Aŭtoro: Aleksander Korĵenkov. Mi malŝaltas la lumilon, estas tempo ekripozi, alimaniere vekiĝo frumatena estos malfacila. Sed la cerbo ankoraŭ ne pretas endormiĝi, ĝin fulme traflugas pensoj pri la vivo de Zamenhof, pri liaj travivaĵoj ne ĉiam feliĉaj aŭ feliĉigaj ene de Esperantujo... Jen sparkas absurda demando: Kion Zamenhof, naskita antaŭ 160 jaroj, pensus pri la nunaj "Esperantoj", se li revenus? Kaj, cerbumante pri tiu dilemo, mi falas vole-nevole en la brakojn de Morfeo. Kaj mi sonĝas. Mi sonĝas, ke ie, en bela florplena ĝardeno, sub pomarbo protektanta min kontraŭ la varma suno, mi sidas sur verda benko kun enmane kajero kaj krajono. Mi ĉirkaŭrigardas kiel se mi estus iun atendanta...

ꕥ ꕥ ꕥ ꕥ

-Bonan tagon, Estimata D-ro Zamenhof! Mi tre feliĉas vidi Vin!

=Bonan tagon, kara samideanino! Granda plezuro estas por mi vin renkonti!

-Kaj por mi tio ĉi estas escepta honoro. Vi jam scias, ke mia celo estas intervjui Vin en tiu ĉi tre grava jaro, 2019: je la 15ª de decembro oni solenos la 160 jarojn de Via naskiĝo. Mia tre kara Majstro, se vi permes...



=Pardonu, ke mi jam antaŭ ol eki interrompas vin: se vi deziras, ke ni daŭrigu en paca kaj amika etoso nian konversacion, vi devas promesi, ne plu nomi min "Majstro".

-Indulgu min, bonvole! Jes, mi memoras, ke dum via kongresa parolado en Krakovo, aŭguste 1912, vi estis interalie dirinta...

=*[...] Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi 'majstron', ke vi ĉesu honori min per tiu titolo. [...] Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu 'majstro', ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.*

-Nu, bone! Mia unua demando estas la sekva: kion Vi pensas pri la nuna situacio de Esperanto kaj pri la laboro de la esperantoj?

=Tre malfacila demando al kiu adekvate respondi, ĉefe mallonge, estas preskaŭ neeble. Sed mi povas provi iel skizi miajn pensojn.

-Ĉiuj opinias, ke dum via vivo Vi spertis egajn malfacilaĵojn, precipe en la rilatoj kun la esperantistoj kaj sekve de iliaj sinteno aŭ konduto. Kaj tio okazis jam, kiam aperis la unua Esperanto-gazeto *La Esperantisto*, kiu tre grave kontribuis al la disvastigo de la lingvo kaj en kiu aperis ĉiaspecaj ideoj, demandoj, kritikoj, rilataj al la gramatiko.

=Ho, jes! Prave! Vidu, tiu gazeto estis forte volita de la esperantistaro, por havi malfermitan podion pri ĉiaj aspektoj kaj de la lingvo kaj de la kreskiĝanta movado. Ĝi estis tre grava interligilo por ĉiuj *disĵetitaj amikoj*, por doni voĉon al iliaj pensoj, por interkonsiliĝi, por proponi agadojn kaj ekscii pri la farado de la aliaj. Plie, mi tuj metis min je dispono de iu ajn, ankaŭ por akcepti konsilojn pri ebla plibonigo de Esperanto.

-Vi ja estis tre demokrata, eĉ troe, pardonu mian impertinentecon. Ĉar interalie Vi estis skribinta ke: «*La lingvo Esperanto ne estas fermita kaj neŝanĝebla*». [...] «*Mi ne volas esti leĝdonanto; mi donis nur la fundamenton, kaj nun mia rolo estas finita, kaj la sorto de la lingvo internacia sin trovas nun en miaj manoj ne plimulte ol en la manoj de ĉiu alia amiko de tiu ĉi lingvo. Leĝdonantaj en la afero de la L.I. de nun devas esti nur logiko, talento kaj la opinio de la plimulto.*»

=Jes, kaj plie mi aldonis, ke *ĉio en la lingvo devos esti tiel, kiel decidos la plej multaj, tute egale, ĉu mi persone konsentos aŭ ne*. Tion mi estis dirinta, ĉar plene konvinkita ke la esperantistaro sekvos miajn konsilojn, pace kaj interkonsiliĝe, sed en la postaj tempoj mi est-

is superŝutita per tiom da proponoj pri ŝanĝado de gramatikaĵoj, de terminoj... ke vere fariĝis troa tiu laboro de legado, pripensado, klarigado, analizado, elektado... Ne ĉio estis inda je konsidero kaj fine ne ĉion aparte mi estus povinta esplori, ĉar tiel la afero ekŝajnis nekonkludebla. Ĉiu proponanto krome pensis, ke lia propono estas ne sole la plej bona, sed eĉ necesa por nia lingvo, eĉ "demando de vivo" por ĝi. Foje oni eĉ insultis min! Tre suferiga tio estis por mi!

-Feliĉe tamen vi sukcesis tiutempe eltrovi akcepteblan solvon, por elturniĝi en tia situacio. Sed ni faru salteton antaŭen, kiam vi proponis kreon de la Tutmonda Ligo de Esperantistoj, *la sola kaj absoluta leĝdonanto en nia afero*. Marto 1890: fondo de la ligo kaj apero de regularo kun informo pri la tri personoj konsistigantaj la provizoran administran Komitaton en Nurnbergo.

=Ĉu vi scias, kio okazis? Apenaŭ la Regularo estis presita, en nia afero, ĝis nun tiel paca kaj regula, tuj komenciĝis malkompreniĝoj, disputoj kaj malagrablaĵoj... Ne estis ankoraŭ kreitaj la oficoj administraj, kaj jam multaj volis esti administrantoj; nenio estis ankoraŭ farita, kaj jam multaj estis malkontentaj, aŭ ofendiĝis, ĉar oni forgesis pri ili en la Ligo; la kaso de la Ligo estis ankoraŭ malplena, kaj jam kelkaj timis, ke la mono publika estos perdita aŭ ne bone uzita. Tial jam post kelkaj monatoj la ideon pri Ligo esperantista mi forĵetis. Tamen ne por ĉiam, ĉar laŭ mi tre gravis tiu unuiĝo de esperantistoj, kiuj kune kaj komune laboru por antaŭenpuŝi nian Aferon.

-Tamen bezonis multe da tempo por alveni al finaj konkludo kaj interkonsento: kiuj tamen estis la plej grandaj malhelpoj al realigo de tiu deziro?

=La nekontroleblaj kaj senfinaj disputoj kaj diskutoj kaj la konkurado senĉesa, kiuj malbonigis la rilatojn inter - mi diru - la diversaj partioj. Tiun staton mi nomis "interna milito". Ĉio ĉi tre afliktis min: *la netoleremeco kaj malamikeco* kiuj regis inter la samideanoj reprezentis la malon de nia idearo, ĝuste kiam unueco estus tiel necesega.

-Tamen ni konsoliĝu, pensante ke malgraŭ ĉio Esperanto daŭre iris antaŭen direkte al sia celo. Parte, ankaŭ danke al tiuj laborantoj kiuj strebis kaj sin strečis - prefere malantaŭ la kulisoj - por ĝin disvastigi. Mi ŝatus reveni, je ĉi punkto al mia unua demando: kion Vi pensas pri la nuna situacio de Esperanto kaj pri la laboro de la esperantoj?

=Dependas de tio, kion vi celas per ĉi demando. Se paroli pri la evoluado de la lingvo, pri ties ĉi pliriĉiĝo en la terminara kampo sekve de la tutmonda progreso, pri la literaturo tradukita kaj originala, pri la abundo de tre eminentaj verkistoj, ĉu proze ĉu poezie ĉu science, jes, mi devas diri, ke mi tre tre kontentas: ĝi evoluis laŭ miaj esperoj, nome kiel iu ajn tiel dirita *natura lingvo*. Esperantistoj povas nuntempe fieri, pri tiom da altnivelaj libroj aktuale legeblaj, rilataj al plej mozaikaj temoj; meritas atenton la multaj ĉiunaciaj klasikaĵoj tradukitaj Esperanten - ni estu fieraj pro tia atingo. Kaj kiom da ĉiufakaj terminaroj! Tio por mi estas grandioza sukceso pri la nedubindeco ke: Esperanto funkcias! Sed bonvole ne petu mian opinion pri... interreto: tio estas tute ekster mia kompreneblo!

-Esperanto bele kreskadis tra la jaroj en ĉiaj kampoj de la homa kulturo, kvankam estas ankoraŭ multaj malplenoj. Bonŝance ne mankas kleruloj klopodantaj elimini la truojn. Sed kiel Vi, ĝenerale, prijuĝas la sistemon aŭ la metodojn laŭ kiuj oni engaĝiĝas kaj laboras por la disvastigado de la lingvo?

=Samkiel iam, ankaŭ nun la esperantistoj sekvas la fluadon de la kolektiva individuismo, kio vualas la klarvidon, ne permesas la liberiĝon de sanaj idealoj, dum male oni devus enfokusigi sian agadon, sian fervoron, nur por favori la pluan ekziston de la lingvo internacia. Ĉio pli kaj pli fariĝas plata, materia, nedonanta spacon al ĉiaj esprimoj de onia spirito. Jes, la tempoj ŝanĝiĝis, tre kaj tre; malfacilas kompari, tute objektive, la agmanierojn, la perspektivojn, la realajn celojn de la iamaj kun la nunaj agantoj. Nia eta popolo respegul/is/as la konceptojn, la aspirojn, la ideojn, bonajn aŭ malbonajn, pozitivajn aŭ malpozitivajn de la tempo en kiu ĝi estas vivanta: ni ne forgesu, ke esperantistoj ĉiaokaze estas parto de la homaro, kiel ĉiuj kun siaj virtoj kaj malvirtoj, kun siaj saĝo aŭ malsaĝo. Malgraŭ la humanismaj kaj pacifismaj sloganoj parto el ili bedaŭrinde strebas al kontentigo de propraj ambicioj, en sia loka eta kampo aŭ en internacia sfero, kaj tio dependa de onia unuopula celaro, kio entute - ne nepre - devas koincidi kun la idearo de la iniciatinto de Esperanto. Esperanto travivis glorajn kaj krizajn momentojn: tio okazas ofte en ĉiu ajn tempo, estas kiel la mara tajdo: ĝi flusas kaj malflusas, foje ĝi kunportas famon kaj admiron, foje malŝaton kaj forgesemon. Nura rekomendo estas: se oni taksas, ke ĉi lingvo meritas viajn tempon kaj laboradon, jen daŭrigu la vojon malgraŭ baroj kaj obstakloj; se ne, ja neniu malhelpos vian foriron!

-Mi eĉ ne havas taŭgajn vortojn por esprimi mian dankon, tre Estimata Doktoro! Per viaj respondoj Vi multon instruis al mi! Anticipe, havu feliĉan naskiĝtagon!

=Elkore mi vin dankas! Vivu Esperanto! Kaj ĉiam antaŭen! ElDo

Fontoj: El "Homarano", Aleksander Korĵenkov - Dua eldono, 2011;
La Esperantisto - 1889-1895

Esperantujo priploras la forpason de LOUIS-CHRISTOPHE ZALESKI-ZAMENHOF

Naskita la 23an de januaro 1925 en Varsovio, la Nepo de L.L. Zamenhof mortis la 9an de oktobro 2019 en Parizo. Li estis la filo de Adamo Zamenhof kaj Wanda Frenkiel.

En la Varsovia Politekniko (1946-49) li diplomiĝis kiel inĝeniero pri konstruado kaj sekve doktoriĝis pri strecbetona teknologio. Ricevinte laborkontrakton de konstruprojektejo *Europe-Etudes* en Parizo, li havis la ŝancon kunlabori kun Eugéne Freyssinet, la inventinto de tiu materialo. Sian karieron li daŭrigis en Francio kaj en aliaj landoj, realigante konstruaĵojn sur tero kaj maroj. Multajn jarojn li lekciis pri la teorio de konstruado en la Arkitektura Altlernejo en Parizo kaj profesoris en Politekniko de Milano pri la uzo de strecita betono por enmara konstruado. Li aŭtoris pli ol cent sciencajn publikaĵojn pri sia fako pole, france, angle kaj Esperante.

Post la emeritiĝo en 1993 li okupiĝis pri faka konsultado, ĉeestis sciencajn konferencojn kaj kongresojn, inkluzive de Esperanto-kongresoj. L.C.Zaleski-Zamenhof edziĝis en 1949 kun Krystyna Tyszka, kaj havis du filinojn: Hanna (1953) kaj Margaret (1958). Li parolis la francan, anglan kaj Esperanton, sed hejme la polan. Li havis la francan kaj polan civitanecojn.

Pri lia esperantista vivo: en 1934 Ludoviko esprimis la deziron partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo. Liaj gepatroj asertis, ke partopreno en Esperanta kongreso, sen koni tiun ĉi lingvon, mistrafas la celon. Do, helpata de siaj onklinoj Zofia kaj Lidia, entuziasme li eklernis kaj ekposedis la lingvon internacian. Tiel komenciĝis lia nova rolo de „eta princo" dum laŭvicaj Esperantaj kongresoj. Li iĝis objekto de interesiĝo por la kongresanaro: en Stokholmo - 1934, en Romo - 1935, en



Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof (la unua de la dekstro); de la maldekstro la gepat-roj Wanda kaj Adam kaj la onklino Zofia (1935)

Vieno - 1936 kaj en Varsovio - 1937, kie li nome de la familio Zamenhof, salutis la kongresanojn.

Alvenis la terura militperiodo: septembre 1939 la germanaj aviadiloj bombadis Varsovion. La domo ĉe Królewska, strato 41, en kiu loĝis la familio Zamenhof, estis komplete detruita. Tiam Ludoviko estis nur 14-jara knabo.

En 1987 Varsovio, kiel „lulilo de Esperanto", estis la ĝusta loko por celebri la centjaran jubileon de la lingvo internacia. La 72a Universala Kongreso de Esperanto evidentiĝis la plej granda en la historio de la movado. Ĝi allogis ses mil partoprenantojn, sen kalkuli proksimume unu milon da gastoj, kiuj alvenis sen la formala aliĝo el Sovet-Unio kaj el aliaj t.n. socialismaj landoj. La direktoro de UEA, Simo Milojević, sukcesis retrovi en diversaj landoj de la mondo sep membrojn de la Zamenhofa familio, kiuj alvenis kiel honoraj gastoj, inter ili Louis Christophe Zaleski-Zamenhof kun la edzino Juliette. Li, kiel la Nepo de la kreinto de Esperanto, varsoviano kaj monde renoma konstruisto de „artefaritaj insuloj" sur maroj kaj oceanoj, montriĝis aparta atrakcio por ĵurnalistoj, sed ankaŭ por la kongresanoj. Tiam Uea elektis lin Honora Membro.

Reaperinte en la movado post dudekjara paŭzo, li jam firme restis en ĝi. Li engaĝiĝis en la popularigon de la lingvo internacia kaj ĝia ideo per siaj intervjuoj por amaskomunikiloj. Li ankaŭ renkontiĝadis kun esperantistoj, kion respegulas la filmo aperinta en la Pola Televido „Spuroj de la Avo". En ĝi la Nepo estas montrita en kelkaj lokoj, ligitaj kun lia avo Ludoviko Zamenhof.

Bjalistoko iĝis ofta vizitcelo de L. C. Zaleski-Zamenhof. En la jaro 2000 li akceptis simbolan diplomon pro la fakto, ke la avo Ludoviko Zamenhof gajnis la unuan lokon en la plebiscito por „Bjalistokano de la 20a jarcento". En la jaro 2007 li estis nomita honora civitano de Bjalistoko apud 14 aliaj distingitoj, inkluzive de Józef Piłsudski kaj Lech Wałęsa.

Dum la 100a UK en Lillo, estante 90-aĝa, li transdonis la taskon reprezenti la familion Zamenhof al la filinoj Hanna Zaruski-Zamenhof kaj Margaret Zaleski-Zamenhof. En tiu ĉi rolo unuafoje prezentiĝis Margaret dum la UK en Lisbono 2018.

Lia memoro restos ĉiam kun ni esperantistoj. Ripozu li en paco!

Fontoj: Gazetaraj komunikoj de UEA, n-ro 830; Vikipedio

Aforismoj

- La homa fantazio estas senmezure pli manka, ol la realo.
- Ĉu vi scias, kio estas la homoj? Mizeraj estaĵoj kiuj devas morti pli mizeraj ol la vermoj aŭ la folioj de la pasinta jaro, kiuj mortis tion ĉi nesciante.
- La sola ĝojo en ĉi mondo estas komenci. Bele estas vivi, ĉar vivi estas komenci, ĉiam, ĉiumomente.

Cesare Pavese, itala verkisto kaj poeto (1908-1950)

Pri valoraj homoj el intaj tempoj en Triesto

Antaŭ kelke da semajnoj plenis la paĝoj de la ĉiutaga ĵurnalo *Il Piccolo* je disputoj kaj diskutoj proaj aŭ kontraŭaj al projekto dismeti en Triesto bronzajn statuojn, hommezurajn prefere, dediĉindajn al lokaj aŭ eĉ nelokaj eminentuloj, ĉi-lastaj tamen iel alligitaj al la urbo (aŭ foje tute ne!). En la pasintaj jaroj oni starigis en la ĉefaj centraj lokoj la statuojn de James Joyce, la irlanda verkisto longatempe vivinta en Triesto (li eĉ scipovis la lokan dialekton!), de la triesta poeto Umberto Saba (lia nomo estis *Umberto Poli*), de verkisto kaj dramisto Italo Svevo (*Ettore Schmitz*).



La plej lasta urbocentra statuo, kiu estis antaŭ, dum kaj post sia lokiĝo centre de ŝtorma agitado fare de duona urbanaro, reprezentas la italan verkiston, poeton kaj dramiston Gabriele D'Annunzio. La inaŭguro okazis la 12^{an} de septembro ĉj. Pluraj estis la kialoj de la kontrastoj inter la diversaj opiniantoj, ĉefe politiktemaj, sed ne nur. Estis parto de triestanoj kiuj protestis subtenante la ideon, ke se oni deziras omaĝi iun elstarulon, unue oni devas informiĝi pri la volo kaj precipe la sentoj de la civitanoj, sekve pri iliaj eventualaj kontraŭdiroj, kaj due, ke Triesto havas inter siaj filoj multajn meritindajn personoj, kiuj agadis, laboradis, inventis ks ankaŭ por la gloro de la urbo mem.

Post pli-malpli deko da tagoj de la supredirita inaŭguro aperis tutpaĝa artikolo en *Il Piccolo*, kies grandlitera titolo jenis: "Triesto rememoras **JOSEF RESSEL**-on, la Elpensinton kiu antaŭ 190 jaroj ekfunkciigis la unuan helicon". Subtitole: "*Pri lia verkaro kunveno en Muzeo Revoltella je la 9^{a} de oktobro kaj prezento de propono dediĉi al li statuon ĉe la marbordo".* Stranga koincido, ĉu ne?



La ĵurnalisto skizas la farojn de tiu Grandulo, menciante ke ĉio ekis de la vaporŝipo *Civetta* (Noktuo), kiu sukcesis navigi nur 5 marmejlojn je ses rapidecnodoj en la triesta golfo, iun aŭgustan matenon el 1829, antaŭ ol halti pro motora averio. Malgraŭ tio la provo, ĉiaokaze, estis sukceso. Estis la unua fojo dum kiu navigilo estis puŝita per helica forto! Tiu avangarda propulsa sistemo estis inventita de la bohema eklektika eltrovinto Josef [*Jozefo*] Ressel (1793-1857). Profesie li estis arbara inspektisto: al li estas dediĉita didaktika naturpado en la karsta altebenaĵo triesta. Li kapablis demonstri, ke la Arkimeda ŝraŭbo (de la 3^{a} jc aK) tre bone uzeblas por antaŭen puŝi la ŝipojn.

Sed kial je la 8^{a} de oktobro la memortago? Tiu dato indikas la tagon de lia morto en 1857: proponis ĝin iu iniciata Komitato celanta indan honorigon de tiu gravulo per lokigo de statuo en iu centra urboparto.

Atentindas, ke tiu Triesto, kiu en 1821 akceptis la junan Ressel (naskiĝintan en Chrudim, Bohemio, en 1793) havis du-flankan sintenon al li: li estis omaĝita de la civitanoj sed neglektita de la institucioj. Sufiĉas konsideri, ke je lia morto urbana komitato realigis proprakoste bronzan statuon, sed la komunuma administracio ĝin rifuzis, kaj tiu statuo nun troviĝas antaŭ la Politeknika palaco en Vieno. Eĉ pli frapa estas la periferia lokiĝo de la stratoj al li dediĉitaj: unu troviĝas en tre fora urba kvartalo, sur la stratplato estas skribita la jena nomo: *Giuseppe* Ressel; la alia, en vilaĝo *San Dorligo*, en industria zono, kaj sur la stratplato legeblas *Josip* - konklude, ambaŭ eraraj.

La klopodoj faritaj de Josef Ressel por esti rekonita kiel la unua inventinto de helico disperdiĝis kune kun dokumentaro, kiun li penis havigi al angla admiralitato en Londono, promesinta riĉan premion al tiu, kiu havis plej grandan rajton sur la inventaĵo.




Nur post lia morto oni agnoskis al li liajn meritojn en la ŝipa kampo, tiom ke Aŭstrio metis lian portreton kaj la desegnon de la *Civetta* sur monbileton da 500 ŝilingoj.


Sed estus redukte pensi pri li kiel nura, simpla elpensinto de helico. Krom patenti globlagrojn sen oleumado, premaparaton por produktado de vino kaj oleo, laminatilon, vapormaŝinon je aermalvarmigo, metodon por produkti sapon kaj pneŭmatan poŝton, li estis precipe noviganto pri agrokultura kaj arbara planado. Estis Josef Ressel kiu ĵetis la bazojn por la renaskiĝo de la karsta teritorio, prilaborante en 1842 projekton por rearbarigado de la komunumaj terenoj en Istrio kaj en la triesta kaj gorizia Karsto. Malgraŭ ke la ĉefa celo estis la provizado de lignaro por la ŝipoj de la Aŭstria Mararmeo, tamen li proponis ke oni konsentu al terkulturistoj planti fruktoarbojn en dolinoj kaj terenoj pli ŝirmataj, tiel ke plialtiĝu la profito de ekonomie malbonstata loĝantaro.

→

Krome neforgesindas, ke li tre atentis pri la efikoj, kiujn la rearbarigado kaŭzus al la klimato, nome ke ĝi ricevus pozitivajn influojn rilate al la atmosfera malsekeco. Entute plurfaceta inventisto kaj eĉ medioprizorganto.

Kaj nun, en 2019, 190 jarojn post la unua provo de helica funkciado, ĉu fine oni sukcesos starigi tiun bronzan statuon, kiun oni rifuzis je lia morto, kaj ankaŭ titoligi lianome la Maran Muzeon, kie troviĝas la modeloj de lia eksterordinara invento kaj de la motorŝipo *Civetta*?







Guglo omaĝis la eminentan figuron de la ĉeĥa inventisto en 2012, je 219 jaroj de lia naskiĝo per la supra bildo: ĝi estis videbla nur en la Ĉeĥa Respubliko.

4a MEMORIALO "LUCIJA BORČIĆ" Zagrebo, Kroatio, 14.-17.11.2019

Provizora programo

Ĵaŭdo, 14ª de novembro

★ Surmeto de floroj ĉe la tombo de L. Borčić
★ Prezento de ŝia verkaro
★ Proklamo de la rezultoj de la 3ª Internacia traduk-konkurso al ŝi dediĉita.

Vendredo, 15ª de novembro

Simpozio "Tradukado de literaturo":
★ Prelegoj
★ Faka vizito
★ Multlingva poezi-vespero

Sabato, 16ª de novembro

Simpozio "Tradukado de literaturo":
★ Prelegoj
★ Vizito de la 42ª Internacia libro-foiro INTERLIBER (Zagreba foiro)

Dimanĉo, 17ª de novembro

★ Vizito de la urbo

Aliĝkotizo: 15 eŭroj

Diversaj loĝeblecoj (jam de 15 eŭroj tage); aparta avantaĝo por programkontribuantoj!

Organizas:

KEU-Kroata Esperantista Unuiĝo

3ª Tradukkonkurso "Lucija BORČIĆ"

Honore al Lucija Borčić (26jul1921-14nov2015) Kroata Esperantista Unuiĝo lanĉis literaturan konkurson de iu ajn nacia lingvo al Esperanto.

La konkursaj branĉoj estas la jenaj:
· poezio: maksimuma longo ne fiksita
· prozo - rakonto aŭ novelo: maksimuma longo 30.000 tajperoj (kun spacoj).

La rezultojn oni publike anoncos la 14an de novembro 2019 en Zagrebo, okaze de la memorkunveno al Lucija Borčić.

La organizantoj disdonos ĝis tri premioj por branĉo. La aliro al la konkurso estas libera al ĉiu Esperantisto, kiu rajtas partopreni per maksimume tri konkursaĵoj/verkoj kiuj antaŭe ne estis publikigitaj, ĉu en la presa, reta, bloga, fejsbuka formoj.

Al la konkursaĵo oni nepre aldonu jenajn informojn: nomon kaj familian nomon, poŝtan adreson, retadreson de la konkursanto; titolon de la originalo, nomon kaj familian nomon kaj la bazajn datumojn de la aŭtoro de la tradukita verko.

La tradukaĵojn kune kun la originalaj tekstoj kaj aldonaj informoj oni sendu al la retadreso:

hes@hes-keu.hr

Opero en Esperanto

La 27an de septembro 2019 la Nacia Teatro de Prago surscenigis la operon *Sternenhoch* kadre de la Internacia Teatra Festivalo en Nitro. La prezentaĵo estas rete elsendata kun subtekstoj en la ĉeĥa, angla kaj aliaj lingvoj. La premiero de tiu ĉi versio okazis la 7an de aprilo 2018 ĉiam en la sama teatro, kaj ĝi estas la unua komplete esperantlingva lirika opero.

La libreto, verkita de la ĉeĥa komponisto Ivan Acher surbaze de la groteska, ekspresionisma romano *Utrpení knížete Sternenhocha* (La suferoj de la princo Sternenhoch), publikigita en 1928 de la ĉeĥa poeto kaj filozofo Ladislav Klíma, estis rekreita en Esperanto de la ĉeĥa esperantisto Miroslav Malovec, kiu ricevis la diplomon de UEA pro Elstara Arta Agado en 2019 sekve de tiu traduko.

La kultura platformo OperaVision (http://operavision.eu), financita de la programo de Eŭropa Unio "Kreiva Eŭropo" kaj disponebla en la franca, germana kaj angla, celas konatigi la mondon de opero al la plej vasta kaj diversaĝa publiko per reta dissendo kaj disponigo de operoj, al kio aldoniĝas artikoloj, intervjuoj kaj aliaj uzeblaj rimedoj por la publiko, kiu deziras alproksimiĝi al

Novembra Programo

1a, vendredo	**Ekde 18h00 Sidejo malfermita**
5a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
8a, vendredo	20h00 - Videoj kaj fotoj pri la 86ª Itala Kongreso
12a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
13a, merkredo	14h50 - Alirprogramo RAI 1 - Ni lernu Esperanton! Kial, kie, kiel, kiam?
15a, vendredo	20h00 - El la Aktoj de Kunveno, Romo 2017, pri L.L. Zamenhof
19a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
22a, vendredo	20h00 - Ni prepariĝu por la inaŭguro de Ekspozicio en Gorizia!
26a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
29a, vendredo	13h30 - Centro Servizi Volontariato FVG: Kurso pri kiel disvastigi vian agadon 20h00 - Legado de artikoloj el **UNESKO-KURIERO**

Decembra Programo

3a, mardo	**18h00 - Inaŭguro de la ekspozicio pri L.L.Zamenhof en la Sinagogo de Gorizia**
6a, vendredo	20h00 - Poezia vespero: Triesto inter Maro kaj Karsto
10a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
11a, merkredo	14h50 - Alirprogramo RAI 1 - Niaj venontaj kulturprogramoj
13a, vendredo	20h00 - Ni laboru por digne festi la Zamenhofan Tagon!
15a, dimanĉo en Triesto	10h30 - Ni atendas vin ĉiujn por la **ZAMENHOF-TAGO!**
20a, vendredo	20h00 - Kristnaska kaj Jarfina Festoj: **Kune per k por Esperanto!**

Programo - Januaro 2020

7a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
10a, vendredo	20h00 - Niaj agadoj en 2020: aranĝoj, vizitoj, seminarioj, ktp,
14a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
17a, vendredo	20h00 - Legado de artikoloj el "**UNESKO-KURIERO**"
21a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
24a, vendredo	20h00 - La Ekspozicio en Gorizia: raporto kun bildoj
28a, mardo	18h00 - Dua-grada kurso
31a, vendredo	20h00 - Konversacia Rondo pri Triesta kuirarto - kunportu viajn specialajn receptojn.

tiu arta formo kaj deziras plukreskigi siajn konojn tiurilate. La projekto kunigas 29 partnerojn el 17 eŭropaj landoj kaj disvolviĝas sub la superrigardo de *Opera Europa*, asocio de operaj kompanioj kaj festivaloj en Eŭropo.

Kadre de tiu ĉi ampleksa kultura projekto la opero *Sternenhoch* estos rete spektebla ĝis la 26ª de marto 2020. La tuta enhavo estas rigardebla senpage, kun subtitoloj en la franca, germana kaj angla lingvoj, kun ebleco je aŭtomataj subtekstoj en 114 pliaj lingvoj.

Trovu ligilon al la opero *Sternenhoch* en OperaVision ĉi tie: https://operavision.eu/en/library/performances/operas/sternenhoch-national-theatre-prague.

Aldone al la filmo de la opero, ĉe la retpaĝo de OperaVision disponeblas aliaj filmetoj kaj intervjuoj. Se vi deziras malkovri pli pri la fono de la opero kaj pri la elekto de Esperanto por tiu ĉi opero, bv. spekti ĉe Jutubo mallongan prezenton de la reĝisoro Michal Dočekal (https://www.youtube.com/watch?v=Hziv3vOx9a0) kaj tre interesan intervjuon kun la komponisto Ivan Acher, kies unua verko estas fakte *Sternenhoch* (https://youtu.be/pE1ieVjoPY4). Ambaŭ kontribuoj estas subtekstitaj en Esperanto.

UEA varme invitas ĉiujn interesitojn spekti la operon kaj tiel subteni tre gravan kaj interesan manifestiĝon de nia lingvo en la internacia kultura medio. Fonto: *Gazetaraj Komunikoj de UEA*

Bonan Kristnaskon 2019an
kaj Pacan 2020an Jaron
al la TEA-anoj kaj Gelegantoj
deziras Triesta Esperanto-Asocio!



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Pošta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org